



# La Riverego

Somero de 1993

Esperanto-Societo Kebekia

N<sup>o</sup> 31<sup>a</sup>, Jarkolekto 8<sup>a</sup>

## Sensoj kaj sentoj

Eckhard Bick

De jeunes Suédois ont mis sur pied un festival pour célébrer la culture espérantiste originale. La quatrième édition de cet évènement biennal aura lieu cet été à Copenhague, au Danemark. Si vous comprenez toutes les allusions de ce texte, vous êtes véritablement imprégnés de culture espérantiste jeunesse...

**U**nuavide, Esperanto ja estas afero por la intelekto — logika, brila, analizebla, kaj facila konkeraĵo en la bretaro inter la vortaroj de viaj kvin aliaj lingvoj. La sociologio de Esperantujo spegulas tion: intelektuloj, matematikuloj (eĉ pinte de TEJO...), lingvistoj kaj lingvuloj, tiuj kiuj kultivas sian lernivon, atas, itas kaj ŝvitas traduke. Duavide (duaaŭde, duapalpe?), kelkaj el ili tamen eltrovas, ke Esperanto havas animon kaj senton, verkiĝas poemoj kaj serĉiĝas amik' en kongres' en Afrik'. Sed la poemoj restas en tirkesto aŭ eldoniĝas postmorte en ontaj antologioj. Kiam finfine vin vizitas la amik', vi kune aŭdas internacian muzikon en nacia diskoteko, spektas internacian filmon en nacia kinejo kaj ludas internacian komputilan ludon en internacia komputilo — en la angla... kaj la muziko, la filmo kaj ludo... Vi tamen kontentigas viajn sensojn en la angla!

### Esperanta kulturo — ne dankon??

Kaj kie (ĉu entute?) vi povas sensumi esperante? La sentoj — jes, batas la kor', la kor' en ISO, la esperanta amo kiel lingva meta-fenomeno... Sed la sensoj, esperantavide, atendas la internacian vesperon. Sufiĉe ofte kun tradukitaj fabeloj, skeĉoj, naciaj kantoj kaj naciaj popoldancoj, naciara vespero, sed ĉu internacia? Pure originala esperanta arto ne havas multajn forumojn — kvankam unu foiron, la L-an...

### Elstara kultura aranĝo: KEF

De tempo al tempo okazas provoj ŝanĝi tion, per artaj semajno-oj kaj -finoj, svisaj staĝoj, polaj kaj italaj kooperativoj, — kaj per la sveda KEF. Kiel sola, KEF strikte rifuzas ĉian neoriginalan arton, kaj preferas ĉe kontribuado la riskon de ne-konateco al la «stigma» de nacilingva deveno. La Kultura Esperanto-Festivalo, 4-5-taga, okazis la unuan fojon en 1986 en

Upsala, kelkajn tagojn post Ĉernobilo. Ĝi havis ĉion, rokon por la orelo kaj gamboj, teatron por la okuloj, ĝi eĉ nove ligis artojn per ekzemple bilda kaj tambura akompano de avangardaj poemoj. Kaj ni dancis spontanee aranĝitan 28-strofan ĉendancon pri Ĉernobilo. La dua KEF, en Lund, jam instalas bienalan tradicion. Ĝi altiris la atenton de la ekstera mondo en formo de la dana televido, kiu por sociografista studo alportis grupon de maljunuloj al la junula festivalo. Dum en la ĉefsalono aedis la bravaj bardoj, kaj tondris la originalaj rokaĵoj, la televido sur la teraso studis esperantajn kantojn el la 20<sup>aj</sup> kaj 30<sup>aj</sup> jaroj. La sensoj de KEF ne atingis kaj ne povis ŝanĝi la mesaĝon en la televido: Esperanto nur havas historian intereson. En la tria KEF, en Västerås, la esperantistoj filmis, amatore, sed mem. Filmis originalan kantarton el diversaj landoj de la ankoraŭ ne tute Sendependa Ŝtataro, la polajn teatrojn kaj la UK-aspektan ĉasistan duopon kun sia plasta krokodilo. Ĉu vi ŝatus amplifiki? — Ne, mi, persone... Originaleco ĝisosta, ĝisAosta, se vi

## ...Sensoj kaj sentoj

celas la arton festivali... sed tio estas la alia rakonto, la sentoj.

## Forumo por originala E-kulturo

La senco de la sensoj de KEF estas krei facile alireblan forumon por originala esperanta arto, en juna kaj plejparte amasloĝeja etoso (la kotizoj atingu la artistojn, ne la gastigejojn!). Ĉiu povas partopreni, ankaŭ sen prezenti ion (kio

estus artisto sen spektanto?!), sen sensaj baroj, kaj ne timu ke vi devas multe diskuti (ne estas Pula), aŭ multon manĝi (ne estas Vasto Marina), aŭ multon pagi (ne estas KCE), aŭ multe frosti (ne estas Bad Kleinen)... ne, estas Kopenhago, kiu aŭguste gastigos la kvaran KEF, varma, ĉarma, bela Kopenhago. Dana EJDO pruntas festivalon de sveda SEJU, jen nordia kvinpinta (ĉi-rilate preskaŭ kvinpetala) kunlaboro. Sed mi ne disklaĉu pli... [El tejo-tutmonde, aprilo-junio 1993]

**La ekstera mondo** ne lernos esperanton por partoprenadi niajn klubojn aŭ kongresojn, nek por sendadi novjarajn salutojn, nek por mendi en restoracio kafon. La ekstera mondo lernos ĝin nur tiam kiam ĝi estos portanto de informoj gravaj por komercado, industrio, scienco, kulturo kaj sporto. Tiam la homoj lernos ĝin volonte eĉ sen varbado kaj propagando. Propagandi facilan, noblan, sed nur ludan lingvon estas kiel propagandi malplenajn botelojn kaj miri ke la homoj preferas la plenajn, eĉ se pli malfacile porteblajn. (Miroslav Malovec, el *esperanto* feb. 1993)

**Esperanto kaj ĝia movado** (alia koncepto ol komun-umo) estas parto de vasta socikritika tradicio, kies bazaj premisoj ankoraŭ plene aktualas: homa egalvaloro; lingvo kiel homa rajto; lingva kaj kultura diverseco kiel kolektiva rajto; ebleco kaj respondeco serĉi lingvajn, sociajn kaj politikajn solvojn kiuj garantias la ĉi-suprajn rajtojn; rajto de homo senti kaj esprimi apartenon al transnacia komunumo. (Mark Fettes, el *esperanto*, jan. 1993)

# Internacia junulara semajno

**Hungara Esperanto-Junularo** invitas vin al agrabla somera feriado en internacia esperantista etoso. **Internacia Junulara Semajno** okazos en kastelo de Mikosszéplak en okcidenta parto de Hungario, 35 kilometrojn de urbo Zalaegerszeg, kiun vi povas facile atingi trajne. Mem en la parko de kastelo estas banejo,

sportejoj, romantikaj vojoj, sed 4 kilometrojn for troveblas ankaŭ lageto kun tendumejo kaj restoracio.

En la programo vi trovas ludojn, prelegojn, koncertojn. Ni organizos la tradician balon kaj kompreneble ne mankos la programoj: nokta bivakfajro, diskoteko, ekskursoj, libroservo, nokta bufedo. Ni organizos

karavanon al IJK en Bulgario, do vi povas prepari vian esperanto-etoson dum **IJS 93**.

La partoprenkotizo estas inter 190 kaj 310 nederlandajn guldenojn.

Informojn petu de **BUDAI TIBOR, H-8900 Zalaegerszeg, pf. 263, Hungario**.

*La Riverego (Le fleuve)* est publiĉ par la Societ  qu b coise d'esp ranto en mars, juin, septembre et d cembre. D p ts l gaux: biblioth ques nationales du Canada et du Qu bec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilit  des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopi    150 exemplaires sur papier recycl  Nouvelle Vie, par Photocopie M tro. Gratuit pour les membres de la S.Q.E. Autrement, l'abonnement annuel est de 10 \$.

*La Riverego* estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia, en marto, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotkopiita 150oble de Photocopie M tro, sur reuzpapero. Senpage por la membroj de E.S.K. Por aliaj, la jara abono kostas 10 CAD. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

** ch ance pour le prochain num ro / limdato por la venonta numero: 1993.09.01.**

R dacteur: / redaktis Sylvain Auclair. Ont collabor    ce num ro / kunlaboris al   tiu numero: Suzanne Bolduc, Zdravka Metz.  
Administrateurs de la S.Q.E. / estraranoj de E.S.K.: Normand Fleury (pr sident / prezidanto), Danielle B dard (vice-pr sidente / vicprezidanto), Sylvain Auclair (secr taire-tr sorier / sekretario-kasisto), Jean-Claude B langer, Yvon Roux

**Esperanto-Societo Kebekia / Societ  qu b coise d'esp ranto**

6358-A, rue de Bordeaux  
Montr al Qu bec H2G 2R8  
R pondeur / telefonrespondilo: (514) 272-0151

# À quand le bon sens dans la communication internationale ?

Claude Piron

Des millions de jeunes apprennent les langues, et cela coûte des milliards. Mais quand ils ont atteint l'âge adulte, cet investissement s'avère si efficace que les États doivent engloutir de nouveaux milliards dans leur système absurde de communication. Pour la seule année 1989, les services linguistiques de la Communauté européenne ont coûté aux contribuables près de deux milliards de dollars. *Chaque mot écrit y revient à 40¢*: le coût a doublé en dix ans. Or, ces chiffres astronomiques débouchent sur une communication de piètre qualité: on a besoin de micros et d'écouteurs; malentendus et omissions abondent; beaucoup de participants à la vie internationale sont acculés à s'exprimer dans des langues qu'ils maîtrisent mal et donc désavantagés dans toute négociation serrée; la traduction des documents implique des délais considérables. Ceux qui subissent ces inconvénients sont pourtant les privilégiés de la communication: délégués et représentants d'États ayant des équipes linguistiques à leur service. Pour le commun des mortels, la communication est nulle ou de niveau très médiocre. Dans d'innombrables cas (touristes en mauvaise posture, contacts médecin-malade dans un pays dont on ignore la langue, réfugiés...), le manque de moyen commode de

communication suscite des problèmes agaçants ou douloureux. Mais au lieu de présenter honnêtement la situation, notre société fait tout pour la dissimuler

## Fausse croyance

On nous fait croire:

1) qu'il n'y a pas de problème, l'anglais étant utilisé partout;

2) qu'on peut apprendre les langues à l'école;

3) que les inconvénients du système actuel sont d'importance secondaire;

4) qu'il est impossible de s'organiser autrement. Aucune de ces affirmations

ne résiste à la vérification. En fait:

Dans d'innombrables cas, le manque de moyen commode de communication suscite des problèmes agaçants ou douloureux. Mais au lieu de présenter honnêtement la situation, notre société fait tout pour la dissimuler.

dans six pays d'Europe occidentale que seuls 6 p. 100 de la population comprennent réellement cette langue. La solution par l'anglais n'est qu'un mythe.

2. L'enseignement scolaire des langues ne conduit pas à leur maîtrise, car pour posséder une langue étrangère il

faut transformer en réflexes des centaines de milliers, voire des millions de détails dépourvus de valeur informative, et l'école de pourra jamais consacrer à cette seule activité tout le temps nécessaire. En France, au niveau du bac, un jeune sur cent seulement

est capable de s'exprimer correctement dans la langue apprise.

3. La traduction et l'interprétation sont des activités économiquement et socialement stérile. Or, les montants affectés à une activité ne sont plus disponibles pour une autre. Cette lapalissade doit être répétée, car les États n'en tiennent aucun compte. Exemple: les États-Membres de l'Organisation mondiale de la santé, à la session même où ils accordaient une rallonge de 5 millions de dollars aux services linguistiques, écartaient *faute de fonds (!)* un ensemble de projets réalistes, bien étudiés, destinés à améliorer la santé en Afrique et ne demandant au total que 4,2 millions de dollars.

4. Lorsque des personnes de langues différentes veulent communiquer, elles ont le choix entre divers systèmes variant suivant la situation et leurs compétences linguistiques: gestes, baragouinage, anglais, interprétation simultanée, espéranto, etc. Si l'on étudie le rapport efficacité/coût pour chacune de ces méthodes, on s'aperçoit qu'il en existe une, et une seule, qui assure une communication d'excellente qualité pour un investissement minime en argent, en temps et en effort. Cette formule élimine complètement le

## ...À quand le bon sens...

coût de la traduction et de l'interprétation; met les partenaires sur un pied d'égalité; ne nécessite aucun délai pour la transmission des documents; permet la communication confidentielle (contrairement au passage par un interprète); favorise l'aisance dans l'expression; respecte l'identité ethnique, nationale et culturelle de chacun; stimule la connaissance mutuelle des cultures; permet mieux que les autres l'expression spontanée des sentiments et le dialogue cœur à cœur entre personnes de langues différentes. Cette formule, c'est l'espéranto. Sa supériorité par rapport aux autres systèmes est facile à vérifier dans la pratique. De quel droit la dissimule-t-on?

### Avant de juger, les faits

La justice exige qu'on ne prononce pas de verdict avant d'avoir étudié les faits avec sérieux. Mais aucun gouvernement n'a jamais permis à ses citoyens de juger en pleine connaissance de cause. Jamais un gouvernement n'a dit: «Nous utilisons des milliards que nous prélevons chez vous, contribuable, pour des activités stériles de traduction et d'interprétation. Etes-vous d'accord? Ou préféreriez-vous

que nous organisions la communication linguistique de façon moins aberrante, de manière à libérer ces fonds pour des activités propres à accroître le bien-être des populations?» Jamais un gouvernement n'a dit: «80 ou 90 p. 100 d'entre vous choisissez l'anglais comme langue à enseigner à vos enfants. Sachez que la grande majorité d'entre eux ne le posséderont jamais. Par contre, si nos divers États se coordonnaient pour organiser l'enseignement de l'espéranto, au bout d'une année scolaire (avec le même nombre d'heures hebdomadaires que pour l'anglais), vos enfants pourraient communiquer d'un pays à l'autre avec l'aisance qui est la leur dans leur langue maternelle: la barrière des langues n'existerait plus. Ils pourraient alors étudier d'autres idiomes, non pour acquérir un moyen mondial de communication — cette fonction serait réservée à l'espéranto — mais à titre d'enrichissement culturel, pour découvrir un autre univers, pénétrer une autre mentalité, mieux comprendre tel ou tel peuple.» Pourquoi les gouvernements ne jouent-ils pas cartes sur tables? Pourquoi nous cachent-ils la vérité? Le moment n'est-il pas venu de les acculer à une politique honnête et intelligente en matière de langues? De remplacer la gabegie par le bon sens? [L'espéranto en marche, février-mai 1993]

## L'union fait la force

Deux revues espérantistes viennent de disparaître dans l'hémisphère sud: *The Australian Esperantist* et *Nov-Zelanda Esperantisto*. Ne nous désolons quand même pas, au contraire: les deux périodiques se sont fusionnés, sous le nom *Esperanto sub la Suda Kruco*. Saluons cette initiative, rare dans le monde espérantiste où chaque minigroupement désire son propre bulletin, rarement viable. [esperanto, fév. 93]

### Ideala daŭro por E-aranĝo

Laŭ mi estas iu kutimo en Esperanto-aranĝoj ke la vere interesaj diskutoj pri la temo komencas okazi la lastan vesperon. Tiel okazis ankaŭ en Torino. Do, mi havas proponon pri ideala tempodaŭro por seriozaj Esperanto-aranĝoj: ili daŭru du tagojn pli longe ol laŭprograme. Tutsimple. [Christian Moe, el tejo-tutmonde, januaro-marto 1993]

## Oficialaj kaj neoficialaj diskutoj

Christian Moe

Ĉiam imponas min la homoj kiuj venas al tiaj ĉi seminarioj (kiaj la TEJO/KER-seminario, okazinta en Torino en novembro de 1993). Dum la matenmanĝo, miaj apuduloj diskutis manierojn skribi ĉinajn karaktrojn komputile (mi mem apenaŭ sukcesas pri Esperantaj). Dum la tagmanĝo, oni klarigis al mi alternativ-fizikajn teoriojn pri la

interna tempo de disipaj strukturoj (interna tempo, supozeble estas tio, kion havas la italoj, sed mi ne scias ĉu ili vere estas disipaj — aŭ strukturaj).

Kaj vespermanĝe oni verŝajne parolis pri kultura relativismo, aŭ pri kompara simboluzo en la popolkantoj de mezaziaj minoritatoj, aŭ pri la lasta sciencnivela

esploro pri la nombro da butonoj en la jako de L. L. Zamenhof. Aŭ eĉ pli verŝajne, oni parolis pri neĉeestantoj, kaj ties lastatempaj skandaloj. (Do, se vi ne ĉeestis, ĝoju pro tio, ke ni pensis pri vi, kaj dankon pro la amuzo!) [el tejo-tutmonde, januaro-marto 1993]

# Ĉu ni ĉiam bone klarigas okazajon ?

Lucien Auger. Elfrancigis Zdravka Metz

Agrablaj emocioj donas bonan humoron kaj malagrablaj emocioj ludas gravan rolon en nia malfeliĉo.

**Vi gajnis premion.** Mi estas bona, hura!

**Vi perdis la ludon.** Mi estas stulta, bu-u-u!

Estas do tre grave povi kompreni la kaŭzon de niaj emocioj, de la agrablaj kaj de la malagrablaj. Tiel ni lernas **regi emociojn, sentojn.**

Memoru ke regi aferon ne estas nur io negativa. Se vi regas la kranon de via duŝo, vi povas malfortigi la fluon de varma akvo por ne bruli sub bolanta akvo.

Same estas kun emocioj. Regi ilin signifas povon pligrandigi tiajn, kiaj plaĉas al ni kaj malfortigi aŭ eĉ malaperigi tiajn, kiajn ni malŝatas.

Por regi aferon, ni bezonas koni ĝian

**kaŭzon, originon, fonton.**

Klopodu ni koni la kaŭzon de niaj emocioj kaj faru ni po unu ekzercon en tago.

## Travivaĵo

Pensu, ke vi promenas apud ĉefvojo en kamparo. Vi estas vestita per tute novaj vestaĵoj.

Vi atentis kaj iras laŭ la maldekstra flanko de la strato, kie trafiko maloftas. Hieraŭ pluvis, kaj malgraŭ la bela tago, restas flakoj kelkloke sur la strato.

Vi vidas alveni grandan veturilon dum vi alproksimiĝas al flako. La ŝoforo certe rimarkis vin ĉar vi vidas kiel li direktigas sian veturilon por ne ŝprucigi al vi.

Sed lastsekunde la ŝoforo subite turnas stirilon kaj iras precize meze de

la flako, ŝprucigante akvon kaj koton al vi.

Vi estas malseka kaj malpura de kapo ĝis piedoj. Kia vi sentas vin? Kiajn emociojn vi havas? Preskaŭ certe vi estas kolera, furioza.

La aŭtisto tiam haltigas sian aŭton kaj iras al vi, petante pardonon pro sia ago. Li diras al vi: «Mi klarigos al vi tion, kio okazis, ĉar vi ne povas scii tion. Kiam mi devas apudpasi vin, mi ekvidis malantaŭ vi infanon, kiu subite ekmarŝis en la straton kaj, por ne trafi ĝin, mi rapide turnis stirilon, kio kaŭzis vian malsekiĝon.»

Vi turnas la kapon kaj ekvidas infanon apud ni, ni diru via filo aŭ filino, kiu ankoraŭ timtremas. Kia vi sentas vin? Kiajn emociojn vi havas?

Verŝajne plurajn, eble dankema, sed certe ne plu kolera kontraŭ la aŭtisto.

Samtempe vi estas ankoraŭ malseka. Se la akvumado estas la **kaŭzo** de via kolero, kial la kolero malaperis? Pro tiu simpla kaŭzo, kiun tuj klarigos al vi psikologo.

Malsekiĝo ne estas la **kaŭzo** de via kolero. La vera kaŭzo troviĝis en via menso, aŭ pli bone en via la kredo kiun vi faris en menso ĉe la ŝprucigo. Vi diris al vi mem: «Kia fripono, li intencis!» De kiam la ŝoforo klarigis al vi, via kredo ŝanĝiĝis.

Vi nun diras al vi: Li bone agis. Kia feliĉo, ke mia filo estas vivanta.»

Konklude, niaj emocioj ne estas kaŭzitaj de tio, kio okazas al ni, sed de tiuj ideoj kaj kredoj, kiujn ni flegas rilate tiujn okazaĵojn. Eventoj estas nur okazoj, pri kiuj ni donas malsamajn emociojn depende de nia interpretado aŭ klarigado.

Nun ni povas kompreni kial pluraj personoj ne sentas samajn emociojn ĉe la sama evento. Tute simple, ĉar ili malsame klarigas al si la okazaĵon, ĉar ili ne havas samajn ideojn rilate tiun eventon.

## Esperanto kaj entreprenoj

Edmond Ludwig

Un jeune entrepreneur en construction alsacien utilise l'espéranto dans son entreprise. Voici pourquoi.

**Monato:** Vi estras konstru-entreprenon kaj Esperanto iĝis por vi laborlingvo. Kiel, praktike, vi uzas Esperanton?

**Michel Basso:** Tre malfacilas trovi kvalifikitajn laboristojn pri la konstruaj metioj en Francio. Danke al la Esperanto-gazetaro mi povis dungi laboristojn el Pollando, Bulgario kaj Litovio kaj nia komunikilo estas Esperanto.

**Monato:** Ĉu vi rilatas kun eksterlandaj entreprenoj?

**Basso:** Mi estas membro de Internacia Ekonomia kaj Komerca Fakgrupo. Baldaŭ mi intencas krei internacian asocion de kontruistoj. Cento de profesiuloj jam sin anoncis. Miaj kontaktoj kun eksterlando jam ege utilas al mi, ĉar Esperanto rolas kiel ponto-lingvo por tradukado. Mia revo estas la jena: baldaŭ havi la eblecon trovi en aliaj eŭropaj landoj junajn faklernantojn, kiujn mi ne plu trovas en mia lando. Ili povus do lerni metion en pluraj landoj kaj sperti novajn labormetodojn. Esperanto do povus iĝi la lingvo de laboristoj vojaĝantaj tra Eŭropo! Malnova tradicio, sed kun pluso en la komunikado: internacia lingvo!

**Monato:** Kion opinias viaj neesperantistaj samprofesiuloj?

**Basso:** La junaj kolegoj kutime ne konas Esperanton, iuj jam aŭdis pri ĝi, sed ne konas la praktikajn aplikojn. Tion mi montras al ili. Mi esperas, ke la esperantistaro komprenos, ke paralele al nia «ideologio», ni devas reklami pri la praktikaj aplikoj de Esperanto kaj pruvi, ke ĝia kono ebligas ankaŭ akiradon de pli da mono. Tion mi deziras montri. [El *Monato*, aprilo 1993]

## Faux amis

On appelle faux amis les mots espéranto dont la ressemblance avec des mots français nous fait faire des erreurs. Nous en verrons quelques-uns dans cette rubrique.

En espéranto, *impôt* (ou taxe) se dit **imposto**, et pas **imposto**, comme on l'entend souvent. Le mot **imposto** signifie *imposte*, terme d'architecture. Quant au mot **takso**, il signifie *évaluation* et n'a aucun rapport direct avec le fisc. Le verbe **taksi** veut dire *évaluer* ou *estimer*, alors qu'**estimi** veut dire *avoir de l'estime pour*.

On utilise souvent assez mal le verbe **demandi**. Sa meilleure traduction est sans doute *questionner*. De la même manière que l'on questionne quelqu'un sur quelque chose, en espéranto, **oni demandas iun pri io**. Rappelons-nous que **iu** signifie *quelqu'un*, **pri**, *au sujet de*, **io**, *quelque chose*, et que le **-n** est la marque de l'accusatif.

Pour sa part, demander (pour obtenir quelque chose) se dit **peti**, comme dans le mot *pétition*.

## Article inutile

Nous vous parlions dans le dernier numéro du préfixe **mal-**. Voici un autre exemple pour mieux comprendre son usage. Vous savez sans doute que **utila** signifie *utile*. Que signifie donc **malutila**? *Inutile*? Est-ce bien vraiment le **contraire** d'utile?

En fait, **malutila** se traduit par *nuisible*, qui est vraiment le contraire d'utile. Quant à *inutile*, simple négation d'utile, on le traduit en espéranto par **neutila**.

**La publika bildo** de esperantistoj, kiam tia ekzistas, estas tiu de klubo por fanatikaj pensiuloj kiuj renkontiĝas por kanti himnojn kaj flirtigi flagojn kaj fine hejmeniri. Ofte la afero vere statas tiel, kaj estas neniu loko por entreprenemaj kaj ideplenaj homoj. Tiel, la neŭtralaj Esperanto-kluboj fermiĝas en si mem, kaj pli kaj pli malaperas la vera esperantisto de la pioniraj tempoj, homo kulturita, konscia, avangarda, ofte ano de reformemaj aŭ revoluciaj movadoj, kunfondinto de partioj, pli informita pri la mondo ol la ĉirkaŭantoj. [Daniele Vitali, *esperanto*, jan. 1993]

6 Somero de 1993

## Tourner autour du pot

Il y a en espéranto une préposition dont l'usage crée des problèmes à presque tout le monde: le distributif *po*.

Prenons un exemple classique: on a trois enfants et six pommes. On donne deux pommes à chaque enfant. Il y a en espéranto plusieurs manières de parler de cette situation: *tri infanoj ricevas ses pomojn* en est une qui ne dit pas combien de pommes on a donné à chaque enfant; *ĉiu infano ricevas du pomojn* ne dit pas combien il y a d'enfants; on peut cependant tout dire en une seule phrase: *tri infanoj ricevas po du pomojn*. Clair, n'est-ce pas?

C'est plutôt dans une phrase comme *parcourir cinquante kilomètres à l'heure* que l'usage semble se compliquer. En espéranto, on doit dire: *veturi po kvindek kilometrojn en horo*, ou bien *veturi po kvindek kilometrojn hore*. Le *po* ne va pas devant le *horo*, mais bien devant ce qui est distribué, soit les pommes, soit les kilomètres. La phrase suivante: *veturi po kvindek kilometrojn en du horoj* signifie donc *parcourir cinquante kilomètres à l'heure pendant deux heures*, alors que *veturi kvindek kilometrojn en du horoj*, c'est deux fois moins vite.

Dernier point: dans tous les exemples précédents, le nom suivant *po* était à l'accusatif, mais ce n'était qu'une coïncidence due à la structure des phrases. Le *po* n'a pas d'influence sur le cas du nom devant lequel il se place; ce nom garde la forme que sa fonction lui donne, tout simplement.

## Prononcez-le bien!

L'université d'Édimbourg (Écosse) coordonne un projet informatique qui vise à permettre aux locuteurs des neuf langues officielles de la Communauté européenne (allemand, anglais, danois, espagnol, français, grec, italien, néerlandais et portugais) de prononcer correctement les noms de ville, de famille, ou autres. Dans deux ans, on éditera des disques compacts contenant chacun un million de noms, avec la prononciation, l'étymologie et les variations régionales ou locales. On espère vendre le tout aux entreprises craignant d'offenser leurs clients en prononçant mal des noms. Le coût du projet, dont le nom est *Onomastica*, s'élève à 2,5 millions de livres. [Paul Gubbins, *Monato*, mai 1993]

## L'irlandais enfin toléré

L'usage de l'irlandais était jusqu'à présent interdit sur les affiches officielles de l'Irlande du Nord, où seul l'anglais avait droit de cité. Cependant, depuis 1993, les noms irlandais sont tolérés. En fait, des noms de rue et de localité étaient depuis assez longtemps visibles dans les régions «nationalistes» (catholiques) de l'Ulster. La loi ne fait que reconnaître la situation. [Monato, avril 1993]

En France, on parle toujours du danger de l'anglais, mais c'est en fait l'allemand qui obsède les Français. Ceux-ci seront bientôt prêts à appuyer une langue véhiculaire, ne serait-ce que pour nuire à une autre langue. (Umberto Eco, dans *esperanto*, fév. 1993)

## Pikniko sur verdstela insulo

En la rivero Richelieu, iom sude de Montrealo, troviĝas insulo. Sur la insulo, militistoj iam fosis stelforman kanalon, kreante stelan insulon en «lago» sur la pli granda insulo. Tiu stela insulo estante ĉefe herba, ĝi ja estas verda. Ĝi tiom taŭgas por ni, ke mi, Patriko, decidis organizi tie piknikon. Ĝi estas historie interesa loko, ĉar sur la stela insulo troviĝas vizitebla fortikaĵo. Ni do samtempe faros turisman viziton.

**Tiam:** la 12<sup>an</sup> de septembo, je la 10h45. Estas pramŝipo ĉiun duonhoron; se vi alvenos malfrue, venu ĝis ni sur la insulon.

**Tie:** ĉe la enirejo de la ŝipo, sur la 61<sup>a</sup> avenuo, en la vilaĝo Saint-Paul-de-l'Ile-aux-Noix.

**Kun:** via piknikmanĝo, kaj ĉ. 2\$ persone por ŝipi, kaj eksteraj ludiloj.

**Aliĝo:** ne necesas, sed Patriko ŝatus, ke vi anoncu vian alvenon ĉe lin: 270-8856.

## Baltaj ŝtatoj: ĉu plej favora medio por esperanto?

Mathias Behlert

Les pays baltes sont ceux où les circonstances pour l'espéranto sont les plus favorables. Voici pourquoi.

En baltaj ŝtatoj estas sufiĉe bonaj cirkonstancoj por oficiala enkonduko de esperanto kiel supernacia dua lingvo. Kompreneble la esprimo «bonaj cirkonstancoj» estas relativa. Mi scias, ke ili ne vere estas bonaj. Tamen mi asertas, ke ne ekzistas en alia loko de la mondo cirkonstancoj pli favoraj. Kial?

- La sola komuna lingvo inter la popoloj de la tri ĉebaltaj ŝtatoj estas la rusa. Tiun lingvon plejparte la civitanoj ne ŝatas, ĉar ĝi simbolas la rusian imperiismon. Aliaj lingvoj krom esperanto ne konsiderindas kiel anstataŭigo de la rusa.

- En Baltio loĝas relative multaj esperantistoj. Verŝajne preskaŭ ĉiuj civitanoj de tiuj landoj jam aŭdis pri esperanto kaj iom alkutimiĝis al ĝi.

- Baltio troviĝas tre proksime al la naskiĝurbo de esperanto kaj eĉ pli al la naskiĝurbo de ĝia kreinto. La litova estis ja unu el la lingvoj parolitaj en la bjalistoka regiono, instigintaj d<sup>on</sup> Zamenhof krei esperanton.

- Por oficiala enkonduko de esperanto ne necesas krei novajn kapacitojn aŭ malgrandigi la pozicion de respektivaj naciaj lingvoj. Sufiĉas konsekvence forpuŝi la rusan lingvon kaj anstataŭigi ĝin per esperanto.

- En kazo de kreskonta signifo de esperanto ni devas esti prepariĝintaj por gravaj atakoj flanke de la angla lingvo. La «anglolingvanoj» ĝis nun ne taksas esperanton serioza. Sed tio povas rapide ŝanĝiĝi. Tamen ilia potenco, precipe iliaj financaj eblecoj estas grandegaj. Ili havas la potencon subpremi la kreskon de esperanto-movado en ĉiu eŭropa lando, kaj ili tutcerte uzos ĝin. En la ŝtatoj de iama Sovetio iliaj eblecoj estas limigitaj, kaj ili ne sentas sin tre certaj.

Ne ekzistas alia loko en la mondo, kie renkontiĝas tiom da favoraj faktoroj!

Oficiala enkonduko de esperanto en Baltaj ŝtatoj verŝajne kaŭzus ĉenreakcion, kaj la ĉiam pli rapida disvastiĝo de esperanto jam ne estus haltigebla. Personoj mi taksas, ke sufiĉus dek jaroj, kaj ĝi estus la unua lingvo en Eŭropo. Kaj kiam ĝi venkos en Eŭropo, certe daŭros nur kelkaj jaroj ĝis ĝi venkos en la tuta mondo.

Bedaŭrinde, en Litovio, kiel en aliaj landoj de la influfero de iama Sovetio, la intereso pri esperanto subite malkreskis. Por kontraŭefiki tiun evoluon mi proponas strategion. [El *Eventoj*, aprilo(1) 93, el *Litova Stelo*, n<sup>o</sup> 5/1992]

## IJK en Montrealo

de Grant Goodall  
Kantis *rap*-stile usonaj kongresanoj

Mi foje iris al Montrealo  
kie mi troviĝis en granda halo  
Ĉirkaŭis min la tuta mondo  
kaj ni kunvivis en paca rondo

IJK — en Montrealo  
IJK — bela festivalo!

Oni portis nin al indianejo  
al tipio kaj al longa loĝejo  
Mi ĝuis la tagon, estis bela vetero  
sed tipianoj dormis en rivero!

IJK — en Montrealo  
IJK — bela festivalo!

Mi multe ludis sur herbaro  
kaj biciklis urbe sur trotuaro  
La granda pilko tute furoris  
sed hodiaŭ mia korpo ege doloris!

IJK — en Montrealo  
IJK — bela festivalo!

Organizi kongreson estas multe da laboro  
ne estas afero por amatoro  
Pri tio ni dankas kun la tuta koro  
al ĉiuj laborantoj de la LKK!

IJK — en Montrealo  
IJK — bela festivalo!

## Nom de noms

Seán Osborne

Après la conquête anglaise de l'Irlande, au Moyen-Age, on a imposé l'usage des noms anglais, non sans une certaine confusion. On traduisait souvent directement le nom: ainsi Mac an Bhreitheamhnaigh (fils du juge) est devenu Judge, et Mac an Ghabhann (fils du forgeron), Smith. Mais on a parfois tenté de reproduire les sons du nom gaélique; on a ainsi transformé Mac Ambróis (fils d'Ambroise) en Cambridge, et Mac Asmuint (fils d'Asmunt), Casement. Mais le pire casse-tête concerne un de mes ancêtres, Patrick M'Geraghty (1798-1864). Quand je cherche son nom dans les registres, je dois me souvenir comment l'anglais a déformé son beau nom gaélique, Mag Oireachtaigh (fils du membre de l'assemblée): il a reçu 128 «traductions»: de Garrity, Jerety ou M'Garety à MacGarraghty, Magarett ou McGarty pour finir à Megerty (j'ai négligé quelques étapes...). [Monato, mars 1993]

## L'ukrainien en Crimée

Le Ministère de l'Éducation de la République autonome de Crimée, en Ukraine, a rayé l'ukrainien de la liste de matières obligatoires au secondaire. Les nationalistes russes ont ainsi envenimé la situation linguistique de la péninsule, où l'ukrainien, le russe et le tatar ont le statut consitutionnel de langues officielles. Il n'y a cependant aucune école ukrainienne, et le Ministère refuse de dévoiler le nombre de classes ukrainiennes. [Monato, avril 1993]

**Le caractère artificiel de l'espéranto** n'est pas un désavantage. Avant d'avoir des idées plus précises sur l'espéranto, j'étais moi aussi gêné par son caractère artificiel. Mais, en fait, si je ne savais pas qu'il s'agit d'une langue artificielle, je pourrais la croire naturelle. [Umberto Eco, dans *esperanto*, fév. 1993]

### Abonnez vos ami-e-s — Abonigu viajn geamikojn

Abonnez vos ami-e-s à *La Riverego* et faites davantage connaître l'espéranto! D'ici au 1<sup>er</sup> septembre, tout nouvel abonnement que vous nous ferez parvenir — au coût réduit de 7\$ pour un an — vous donne une chance de gagner un bon d'achat de 25\$ à la *Librairie espérantiste de Montréal*. De plus, trois nouveaux abonnements vous permettront de prolonger d'un an votre adhésion à la Société québécoise d'espéranto, gratuitement. Tous les nouveaux abonnés recevront des informations sur l'espéranto et la S.Q.E. Cette campagne prend fin le 1<sup>er</sup> septembre 1993.

Abonigu viajn geamikojn al *La Riverego* kaj diskonigu Esperanton. Ĝis la unua de septembro, ĉiu novabonigo de vi sendita — laŭ rabata prezo: 7 \$ por unu jaro — donos al vi unu eblecon gajni 25-dolaran aĉetrajton ĉe la *Libroservo en Montrealo*. Krome, ĉiu triopo da abonigoj senpage plilongigos vian membrecon en E.S.K. je unu jaro. Ĉiuj novabonantoj ricevos informon pri Esperanto kaj pri E.S.K. Tiu kampanjo finiĝos la unuan de septembro 1993.

Via nomo / votre nom: \_\_\_\_\_

Mi abonigas la jenajn homojn / j'abonne les personnes suivantes:

Nomo: \_\_\_\_\_

Adreso: \_\_\_\_\_

Nomo: \_\_\_\_\_

Adreso: \_\_\_\_\_

Nomo: \_\_\_\_\_

Adreso: \_\_\_\_\_

Mi kromdonacas al E.S.K. / Don supplémentaire à la S.Q.E.: \_\_\_\_\_ \$

Mi pagas entute / Somme ci-incluse: \_\_\_\_\_ \$ Pagu al / payez à: Société québécoise d'espéranto